

1

Greenhorn

Kara leganto, ĉu vi scias, kion signifas la vorto *greenhorn*? *Green* signifas verda, kaj per *horn* oni imagu sensilon. *Greenhorn* do estas homo, kiu ankoraŭ estas verda, do nove kaj sensperte en la lando, kaj nur singarde eltenas siajn sensilojn, se li ne volas meti sin en la danĝeron esti objekto de mokado.

Greenhorn estas homo, kiu ne ekstaras de sia seĝo, kiam *lady* intencas sidiĝi; kiu salutas la estron de domo antaŭ li kliniĝas antaŭ la *mistress* kaj la *mis*; kiu dum la ŝarĝado de pafilo premas la kartoĉon inverse en la tubon, aŭ puŝas unue la ŝtopilon, due la kuglon, kaj fine la pulvon en antaŭŝarĝan pafilon. *Greenhorn* parolas la anglan aŭ tute ne aŭ tre pure kaj afekte. Al li la *yankee*-angla lingvo aŭ eĉ la provincana lingvomiksaĵo estas teruraĵo. *Greenhorn* pensas, ke *racoon*, do prociono, estas didelfo, do marsupiulo, kaj intermiksas sufiĉe belan mulatinon, duonnegrinon, kun kvadronino, filino de blankulo kaj mulatino. *Greenhorn* fumas cigaredojn kaj malestimas tabaksukon elkraĉantan *Sir*-on. *Greenhorn*, ricevinte vangofrapon de irlanda *paddy*, kuras rekte al la loka juĝisto pro plendi, anstataŭ mortpafi la fiulon ĵus tie kiel ĝusta *yankee*. *Greenhorn* pensas, ke la premsignoj de *turkey* estas tiuj de urso, kaj ke malvasta jakto estus *mississippi steamer*. *Greenhorn* ne kuraĝas meti siajn malpurajn botojn sur la genuojn de kunvojaĝanto, kaj ensuĉi supon per ŝmaca spirsono de mortiganta bubalo. *Greenhorn* per puremon kunportas lavospongĉon, granda kiel kalabasego, kaj dek funtojn da sapo en la prerion, kaj enpoŝigas kompason, kiu jam je la tria aŭ kvara tago montras al ĉiu ebla direkto, sed neniam norden. *Greenhorn* notas por si mem okcent indianajn vortojn, kaj kiam li renkontas la unuan ruĝhaŭtulon, li rimarkas, ke li sendis tiujn notaĵojn en la lasta koverto hejmen, kaj anstataŭ retenis la leteron. *Greenhorn* aĉetas pulvon, kaj kiam li volas lanĉi la unuan pafon, li rimarkas, ke oni vendis al li muelitan lignokarbon. *Greenhorn* studadis astronomion dek jarojn, sed povas fiksrigardi la ĉielon samlonge, sen ekscii la kioma horo estas. *Greenhorn* premas la *bonie*-tranĉilon tiel sub la zonon, ke ĝi pikas en lian femuron kiam li kliniĝas. *Greenhorn* bruligas fajron en la sovaĝokcidento, kiu brulas arbalte, kaj miras, kiam li estas malkovrata kaj mortpafata de la indianoj, kiel ili kapablis ek trovi lin. *Greenhorn* do estas *greenhorn* — kaj tia *greenhorn* estis tiutempe ankaŭ mi.

Certe mi ne supozis, aŭ eĉ havis ideon, ke tiu moka esprimo ĝustis al mi! Ho ne, ĉar ja estas ĵuse la plej tipa rimarkebla eco de *greenhorn* supozis, ke ajn ĉiu alia, sed nur ne li mem, estas verda!

Male mi kredis esti eksternorme saĝa kaj sperta homo; ĉar mi lernis multon kaj neniam timis ekzamenon! Ke la vivo estas la vera kaj reala universitato, kies lernantoj estas ekzamenataj ĉiutage kaj ĉiuhore, tion mia juneca menso tiutempe ignoris. Speco de denaska agemo estis kondukinta min trans la oceano en la Unuiĝintajn Ŝtatojn, kie la kondiĉoj de antaŭeniĝo estis tiutempe speciale avantaĝaj por ambicia juna viro. Mi certe povis trovi bonan okupon en la orientaj ŝtatoj, sed io trenis min orienten. Foje tia-, foje aliamaniere dungita

mallongan tempon, mi gajnis tiom, ke mi, ekstere bone ekipate kaj interne plene je bona kuraĝo, venis al St. Louis. Tie la bonŝanco kondukis min al germana familio, je kiu mi trovis intertempan okupon kiel privatinstruisto.

Tiun familion ofte vizitis S:o Henry, pafilfaristo, kiu faris sian profesion per sindonemo de artisto, kaj kiu sin nomis per stimula fiero *Henry, the Gunsmith* (Henry, la Pafilfaristo).

Henry estis granda filantropo, kvankam li tute ne faris tiun impreson, ĉar li kontaktiĝis al neniuj, escepte la menciita familio, kaj eĉ traktis siajn klientojn malĝentile kaj krude, tiel ke ili venis al li nur pro la bonkvalito de liaj varoj. Li estis perdinta sian edzinon kaj siajn infanojn per terura okazo, pri kiu li neniam parolis. Mi komprenis per kelkaj aludoj, ke ili estis murditaj dum rabatatako. Tio estis krudiginte lin ekstere. Eble li eĉ ne sciis, ke li fakte estis kompleta malĝentilulo. Lia interno sed estis milda kaj bona.

Kial la maljuna viro havis preferumon ĵus por mi, la juna fremda homo, mi ne sciis, ĝis li foje diris la kaŭzon al mi. Ekde mi estis tie, li venis pli ofte ol antaŭe, aŭskultis la instruadon, poste komencis interparolojn kun mi, kaj fine eĉ invitis min viziti lin. Tia preferumo antaŭe estis neniam donita al iu alia. Unue mi evitis akcepti lian inviton. Sed mia reteno ŝajnis tute ne akceptata de li. Ankoraŭ hodiaŭ mi memoras lian ĉagrenan vizaĝon kaj la sonon, per kiu li salutis min, kiam mi malgraŭ ĉio fine vizitis lin unu vesperon.

„Nu kie Vi kaŝiĝis, *Sir*?“ li grumblis ĉagrenite.

„Hejme.“

„Kaj kie antaŭhieraŭ?“

„Ankaŭ hejme.“

„*Pshaw!* Tia verda birdo, kiel estas Vi, ne sidrestas en la nesto. Ĝi metas sian bekon ĉien, sed ne tien, kie ili vere estu!“

„Nu, kie mi estu, laŭ Via opinio?“

„Ĉi tie ĉe mi, komprenende. Jam delonge estas io mi volis demandi Vin.“

„Kial Vi ne demandis?“

„Ĉar mi ne volis, komprenende.“

„Nu, kiam Vi volas?“

„Hodiaŭ, eble.“

„Do eku“, mi postulis kaj sidiĝis sur la labortablon, je kiu li laboris.

Li vidis al mi mirigite, skuis la kapon malakceptante kaj vokis:

„Eki, ĉu? Kvazaŭ mi unue devus demandi tian *greenborn* pri permeso, kiam mi volas paroli kun li!“

„*Greenborn*, ĉu?“ mi ripetis, levante miajn brovojn, ĉar mi sentis ofendita. „Mi volas supozi, S:o Henry, ke tiu vorto elglitis sen Via volo!“

„Nu ne afektu, *Sir!* Mi parolis per plena pripenso. Vi estas *greenborn*, kaj kia! La enhavon de Viaj libroj Vi ja bone enkapas, vere. Tute mirigas, kion Vi homoj lernas tie transmare! Vi juna homo scias ekzakte, kiel malproksimas la steloj de tie ĉi, kaj kion la reĝo Nebukadnecar skribis sur brikojn, kaj kiom pezas la aero, kiun Vi eĉ ne povas vidi. Kaj ĉar Vi scias tion Vi imagas esti saĝulo! Sed metu Vian bekon en la vivon, komprenu, nur ĉirkaŭ kvindek jarojn en la vivon! Tiam Vi eble ekscios, kio vera saĝeco estas! Kion Vi scias nun, estas nenio, tute nenio! Kaj kion Vi kapablas nun, estas eĉ malpli! Entute Vi certe eĉ ne kapablas pafi!“

Li diris tion per tre malestima sono, kaj tiel konvinkite, kvazaŭ li estus certe pri sia opinio.

„Mi ne kapblas pafi, ĉu?“ mi respondis ridetante. „Ĉu do tio estas, kion Vi volis demandi min?“

„Jes, tio. Kiel statas tiu afero?“

„Donu bonan pafilon en mian manon, tiam mi respondos, ne antaŭe.“

Tiun momenton li lasis la tubon, pri kiu li laboris, ekstaris, iris proksimen al mi, rigardis min mirigite kaj vokis:

„Ĉu pafilon en la manon, *Sir?* Ne ideos al mi, tute ne! Miaj pafiloj estas nur donataj en manojn, kiuj spertas trakti ilin!“

„Tiajn mi havas“, mi kapjesis al li.

Li denove vidis al mi dube, sidigis, rekomencis prilabori la tubon kaj grumblis:

„Tia *greenborn*. Eĉ povus min furiozigi per lia impertinenteco!“

Mi lasis lin agi laŭ lia volo, ĉar mi konis lin, elpoŝigis cigaron kaj bruligis ĝin. Kvaronan horon estis silento inter ni. Pli longe li ne povis suferi ĝin. Li tenis la tubon al la lumo, vidis tr ĝi kaj komentis:

„Pafado ja estas pli malfacila ol rigardi la stelojn, aŭ legi malnovajn brikojn de Nebukadnecar. Komprenende. Ĉu Vi iam havis pafilon en Via mano?“

„Eble jes.“

„Kiam?“

„Jam ofte.“

„Ĉu ankaŭ celis, lanĉis, trafis?“

„Memkompreneble.“

Li ekmallevis la tubon, vidis al mi kaj diris:

„Jes, trafis, kompreneble. Sed kion?“

„La celon, nature.“

„Nu! Ĉu Vi serioze volas kredigi tion al mi?“

„Aserti, ne kredigi. Estas la vero.“

„La diablo Vin forprenu, *Sir!* Pri Vi oni ne povas esti certe. Mi konvinkitas, ke vi ne trafus muron, eĉ se ĝi estus dek metrojn alta kaj dudek kvin metrojn longa, kaj tamen Vi faras tiel seriozan kaj memcertan mienon dum Via aserto, ke oni povus furioziĝi. Mi ne estas knabo, kiun Vi instruas, komprenende! Tia *greenborn* kaj librulaĉo kiel Vi volas kapabli pafi! Studadis turkajn, arabajn kaj aliajn fiajn foliaraĉojn kaj asertas krome esti havinta tempon pafadi! Do prenu tiun malnovan *gun*:on de la najlo en la muro, kaj ĝin tenu kvazaŭ Vi celus! Estas ursmortigilo, la plej bona, kiun Vi iam tenis en la mano.“

Mi iris tien, prenis la pafilon de la muro kaj kvazaŭcelis.

„Nuuu!“ li elvokis kaj ekstaris. „Kio estas tio? Vi ja traktas tiun *gun*:on kvazaŭ ĝi estus promenbastono, sed fakte ĝi estas la plej pezan pafilon, kiun mi konas! Ĉu Vi havas tian forton?“

Sen respondo mi ekkaptis lin je la butonumita jako kaj la pantalonrando kaj levis lin per la dekstra brako.

„Ĉesu!“ li kriis. „Lasu min! Vi ja estas eĉ multe pli forta ol mia Bill.“

„Via Bill, ĉu? Kiu estas tiu?“

„Li estis mia filo, kiu — sed ni lasu tion! Li mortas, kiel ankaŭ la aliaj. Ŝajnis iĝanta deca ulo, sed estis neigata dum mia neĉesto. Vi similas al li, preskaŭ havas la samajn okulojn kaj ankaŭ la saman trajton je la buŝo. Tial mi petas al Vi — nu, entute ne estas afero Via!“

Esprimo de profunda funebro aperis sur lia vizaĝo. Li glitigis sian manon tra siaj haroj, kaj tiam pluparolis kvazaŭ nenio okazis. „*Sir*, je Via muskola forto estas domaĝege, ke Vi okupiĝadis per libroj. Endis okupiĝi Vin per sporto anstataŭ!“

„Mi ja okupiĝis.“

„Ĉu vere? Ĉu Vi boksis?“

„Tio ne kutimas ĉe ni. Sed mi faris gimnastikon kaj lutadon.“

„Rajdadon kaj skermadon, ĉu?“

„Tion instruis mi.“

„*Sir*, ne fanfaronu!“

„Ĉu Vi volas ekzemplon?“

„Ne, dankon. Sufiĉas al mi la lasta. Entute, mi laboru. Residiĝu.“

Li reiris al sia labortablo, kaj mi sidiĝis flanke de li. La sekvinta interparolado estis tre malmultsilaba. Henry ŝajnis okupiĝi en siaj pensoj per io grava. Subite li ekpaŭzis la laboron kaj demandis:

„Ĉu Vi faris matematikon?“

„Estis unu el miaj plej ŝatataj sciencoj.“

„Ĉu aritmetikon, geometrion?“

„Memkompreneble.“

„Ĉu ankaŭ termezurado?“

„Eĉ kun plezuro. Mi ofte migradis ekstere kun la teodolito.“

„Do Vi povas mezuri, ĉu? Ĉu vere mezuri?“

„Jes. Mi partoprenis kaj en horizontala kaj en vertikala mezuradoj, kvankam mi ne volas diri, ke mi supozas min esti finlerninta termezuristo.“

„*Well* — tre bone, tre bone!“

„Kial Vi demandas tion, *Mr.* Henry?“

„Ĉar mi havas kaŭzon. Komprenende. Ne jam estas Via afero. Vi iam ekscios. Endas scii antaŭe — hm, jes, endas scii antaŭe, ĉu Vi povas pafi.“

„Do ekzameni min!“

„Mi ja ekzamenos, fidu pri tio. Kiam Vi komencos la instruadon morgaŭ?“

„Je la oka horo.“

„Venu al mi je la sesa. Ni iros al la pafejo, kie mi alĝustigas miajn pafilojn.“

„Kial tiel frue?“

„Ĉar mi ne volas atendi plu. Mi estas tute avide pruvi al Vi, ke Vi estas *greenhorn*. Nun sufiĉas. Mi faru gravajn aĵojn.“

Li ŝajne estis pretiginta la pafiltubon, kaj prenis el kesto eĝhavantan feroblokon, kies eĝojn li komencis rondfajli.

Mi vidis, ke ĉiu edro de la ferobloko havis truon.

Li estis tiel atente dum sia laboro, ke li ŝajne tute estis forgesinte min. Liaj okuloj briletis, kaj kiam li rigardis sian verkaĵon de tempo al tempo, mi vidis, ke tio okazigis preskaŭ per esprimo de amo. La ferobloko certe havis grandan valoron al li.

„Ĉu tio ankaŭ estos parto de pafilo, *Mr. Henry*?“ mi demandis.

„Jes“, li respondis, kvazaŭ li rimarkis ĵus nun, ke mi ankoraŭ ĉeestis.

„Sed mi ne konas pafilsistemon, en kiu ekzistas tia parto.“

„Kredinde. Estas ja ne jam ekzistonta. La sistemo ebla nomiĝos la *Henry*:a sistemo.“

„Ho, do nova inventaĵo, ĉu?“

„*Yes*.“

„Tiukaze mi petas pardonon, ke mi demandis! Certe estas sekreto!“

Li vidis en ĉiun truon de la bloko longan tempon, turnis la feraĵon en diversajn direktojn, metis ĝin sur la malantaŭan finaĵon de la tubo, kaj fine diris:

„Jes, estas sekreto. Sed mi fidas Vin, ĉar mi scias, ke Vi povas prisilenti, kvankam mi supozas, ke Vi estas vera *greenhorn*. Mi diros al Vi, kio tio estos. Estos pafilo, multŝargiĝo kun dudek kvin pafoj.“

„Neeble!“

„Silentigu Vian bekon! Mi ne estas tiel stulta, ke mi planus neeblaĵojn.“

„Sed Vi tiukaze havu kartoĉingojn por enigi la municion por dudek kvin pafoj!“

„Mi havas!“

„Sed ili estus tiel grandaj kaj malfacile uzeblaj, ke ili nur malhelpus kaj ĝenus.“

„Nur unu kartoĉingo. Tutfacile uzebla! Tute ne ĝenas. Tiu ĉi bloko estas la kartoĉingaro.“

„Hm! Mi tute ne estas sperta en Via fako, sed kio pri la varmego? Ĉu la tubo ne iĝos tro varmega?“

„Ne ekiedos al ĝi. La materialo kaj la farado de la tubo estas mia sekreto. Cetere, ĉu estas ĉiam necesa lanĉi ĉiujn dudek kvin pafojn unu post la alia?“

„Apenaŭ.“

„Do! Tiu feraĵo estos globo. Dudek kvin truojn enhavos la saman nombron da kartoĉoj. Post ĉiu pafo la globo turniĝos, kaj la sekvanta kartoĉo venos antaŭ la tubon. Mi pensis pri tio longajn jarojn. Ne volis sukcesi, sed nun ĝi ŝajnas esti ebla. Mi havas bonan reputacion kiel *gunsmith*, sed per tio mi estos fama kaj ricevos multan monon.“

„Kaj eĉ konsciencajn tiroĉojn!“

Momenton li vidis al mi tute mire kaj tiam demandis:

„Riproĉojn, ĉu? Kial?“

„Ĉu Vi opinias, ke murdanto ne bezonas riproĉiĝi?“

„*Zounds!* Ĉu Vi volas diri, ke mi estas murdanto?“

„Ne jam.“

„Aŭ ĉu estos murdanto?“

„Jes, ĉar la helpo je murdo estas same malbona kiel la murdo mem.“

„La diablo Vin prenu! Mi gardos min antaŭ helpo je unu murdo.“

„Certe ne je unuopa, sed je amasmurdo! Se Vi pretigos pafilon, kiu pafos dudek kvin fojojn, kaj ĝin donos en la manon de ĉiu ajn fiulo, tiam baldaŭ komencos terura buĉado en la praarbaroj kaj la fendegoj de la montaro. Oni mortpafos la bedaŭrindajn indianojn kiel

kojotojn. Kelkajn jarojn poste ne plu ekzistos unu *indsman*. Ĉu Vi volas ŝarĝi Vian konsciencon per tio?”

Li fiksigardis min kaj ne respondis.

„Kaj se ĉiu homo povos haviĝi tiun danĝeran pafilon per mono, Vi vendos milojn da ĝi post mallonga tempo, sed la mustangoj kaj la bubaloj estos ekstermotaj, kaj kun ili ĉia speco de besto, kies viandon la ruĝhaŭtuloj bezonas pro vivi. Centoj kaj miloj da pafemuloj armigōs per tiu pafilo kaj iros en la okcidenton. La sango de homoj kaj bestoj fluvos kiel riveroj, kaj baldaŭ tiuj ejoj tie kaj ĉi tie estos malplenigitaj je ĉia vivulo.“

„*'s death!*“ li ekvokis. „Ĉu Vi vere nur ekde mallonge transvenis el *Germany*?”

„Jes.“

„Kaj Vi neniam antaŭe estis tie ĉi, ĉu? Kaj ankaŭ ne en la Sovaĝa Okcidento, ĉu?”

„Jes.“

„Do kompleta *greenborn!* Kaj eĉ Vi *greenhorn* parolas tiel plensonaĉe kvazaŭ Vi estus la praavo de ĉiuj indianoj kaj kvazaŭ Vi estus vivinta ĉi tie dum jam mil jaroj. Bubo, do ne imagu, ke Vi povus riproĉi min! Mi ja neniam ekhavos la ideon establi pafilfabrikon. Mi estas sola viro kaj volas resti sole. Mi ne emas ĉagreniĝi per cent aŭ eble pli da dungantoj.“

„Sed Vi ja povus, pro gajni monon, anonci patenton pri Via inventaĵo kaj vendi tiun.“

„Nu, atendu ĝis tiam, Sir! Ĝis nun mi ĉiam havis, kion mi bezonis. Mi pensas, ke mi ankaŭ estonte ne suferos malhavon. Kaj nun Vin igu hejmen hodiaŭ! Mi ne emas aŭdi birdon blekaĉi, kiu unue lernu flugi, antaŭ ĝi rajtas fajfi aŭ kanti.“

Ne ekideis al mi ĉagreniĝi pri liaj malĝentila parolado. Li ja estis, kiel li estis, kaj mi sciis sufiĉe bone, kion li sentis fakte. Mi ofertis mian manon al li kaj foriris, post li estis skuinta ĝin forte.

Mi ne sciis, kiel grava tiu vespero poste iĝis por mi. Same malpli ekvenis en mian menson, ke tiu peza ursmortigilo, kiun Henry nomis la malnova *gun*, kaj ankaŭ la ankoraŭ nepreta Henrypafilo, iam ludus grandan rolon en mia pli posta vivo. Sed mi antaŭĝojis pri la sekvinta tago, ĉar mi fakte estis pafinta multe kaj bone, kaj certis, ke mi sukcesos la ekzamenon de mia maljuna, stranga amiko.

Mi venis al li ĝustatempe je la sesa horo. Li jam atendis min, skuis mian manon kaj diris, dum moka rido videblis je lia maljunaj, bonaj, krudaj trajtoj:

„*Welcome, Sir!* Vi ja havas tute venkocertan mienon! Ĉu Vi pensas, ke Vi trafos la muron, pri kiu mi parolis hieraŭ vespere?”

„Mi esperas.“

„Well, ni baldaŭ scios pli. Mi kunprenos pli malpezan pafilon, kaj Vi portu la ursomortigilon. Mi ne ŝatas porti tian ŝarĝegon.“

Li surŝultris malpezan, duontuban *rifle*-on. Mi prenis la „maljunan *gun*-on“, kiun li ne volis porti. En lia pafejo li ŝarĝis la du pafilojn kaj unue lanĉis du pafojn el sia *rifle*. Poste estis mia vico kun la ursomortigilo. Mi ne jam konis tiun pafilon, kaj tial trafis je la unua pafo nur la randon de la meznigrejo sur la celdisko. La dua pafo trafis pli bone, la tria ekzakte la mezon de la nigrejo. La sekvintaj pafoj ĉiuj iĝis tra la truo, kiun la tria trabatis. La miro de Henry plialtiĝis de pafo al pafo. Mi devis ankaŭ provi la *rifle*-on, kaj kiam tio same sukcesis, li finfine vokis surprizigite kaj entuziasme:

„*Sir*, aŭ estas la diablo en Vi, aŭ Vi estis naskita pro esti okcidentulo. Mi neniam antaŭe vidis *greenhorn*-on tiel pafi!“

„La diablo estas ne en mi, *Mr. Henry*“, mi diris ride. „Kaj ankaŭ mi rufuzos tian gaston.“

„Tiukaze estas Via tasko, kaj eĉ Via devo iĝi okcidentulo. Ĉu Vi ne sentas emon pri tio?“

„Jes, kial ne?“

„Well, ni vidos kion no povos igi el Vi *greenhorn*. Do Vi povas rajdi sambone, ĉu?“

„Mezume bone.“

„Hm! Do ne same bone, kiel Vi pafas, ĉu?“

„*Pshaw!* Rajdi ja estas bagatelo! La surĉevaliĝo estas la plej malfacila aĵo. Kiam mi nur estis sursidinta, neniu ĉevalo min deĵetos.“

Li vidis al mi ekzamenante, ĉu mi parolis ŝerce aŭ serioze. Mi faris naŭvan mienon.

„Ĉu Vi vere kredas tion?“ li demandis. „Ĉu Vi volas Vin fermtenigi je la kolharoj? Tiukaze Vi eraras. Vi diris tute prave: la plej malfacila aĵo estas la surĉevaliĝo, ĉar tion oni faru mem. La deĉevaliĝo estas multe pli facila, ĉar la ĉevalaĉo mem faros tion. Tial tio ankaŭ okazigiĝas multe pli rapide.“

„Sed kun mi la ĉevalaĉo ne faros tion!“

„Ĉu jes? Ni vidos! Ĉu Vi emas montri ekzemplon?“

„Ŝate.“

„Kunvenu! Estas maljam la sesa horo. Restas al Vi ankoraŭ unu horo. Ni iru al Jim Corner, la ĉevalisto. Li havas rozfelulon, kiu certe instruos al Vi la malon.“

Ni reiris en la urbon kaj vizitis la ĉevaliston, kiu posedis larĝan rajdejon, ĉirkaŭata de stalaro. Corner venis mem kaj demandis kion ni deziris.

„Tiu juna *Sir* konstatas, ke neniu ĉevalo lin elseligos“, Henry diris. „Kion Vi opinias pri tio, *Mr. Corner*? Ĉu Vi volas lasi lin rampi sur Vian rozfelulon?“

La ĉevalisto rigardis min ekzamene, tiam kapjesis kontente kaj respondis:

„La ostaro ja ŝajnas esti bona kaj elasta. Krome junulaj koloj ne rompas tiel facile kiel tiuj de pli maljunaj uloj. Se la *gentleman* vere volas provi la rozulon, mi ne kontraŭos.“

Li faris la necesajn ordonojn. Kelkan tempon poste du servistoj kondukis la selitan ĉevalon el la stalo. Ĝi estis tre malkviete kaj provadis sin forŝiri. *Mr. Henry* komencis zorgi pri mi. Li petis min rezigni pri la provo, sed unue mi ne sentis timon, kaj due mi nun supozis la aferon esti aĵo de honoro.

Mi lasis doni al mi vipon kaj surmetis spronojn, tiam mi svingiĝis, post kelkaj vanaj provoj, kontraŭ kiuj la ĉevalo forte defendiĝis, en la selon. Tuj kiam mi eksidis, la helpantoj foriĝis. La rozfelulo eke faris saltegon per ĉiuj kvar gamboj supren, kaj duan flanken. Mi restigis min en la selo, kvankam miaj piedoj ne jam estis en la piedingoj. Ĵus kiam tio estis sukcesita, la ĉevalo komencis obstini. Kiam ĝi komprenis, ke tio ne helpis al ĝi, ĝi ekiris al muro pro deviŝi min. Sed la vipo tre baldaŭ pelis ĝin for de la muro. Post tio komencis kruela batalado inter rajdanto kaj ĉevalo. Mi pene donis al ĝi ĉion: la malmultan lertecon kaj la nesufiĉan sperton, kiun mi tiutempe posedis; kaj la fortegon de miaj femuroj, kiu finfine helpis al mi iĝi venkanto kaj regi ĝin. Kiam mi elseliĝis, miaj kruroj tremis per elĉerpiĝo. Sed la ĉevalo estis malseka per ŝvito kaj havis grandajn, dikajn erojn da ŝaŭmo antaŭ la buŝo. Ĝi obeis nun al ĉiu premo.

La ĉevalisto dume estis timinta pri sia ĉevalo. Li ordonis ĝin meti sub kovrilojn kaj irigi jen kaj reen malrapide. Tiam li turniĝis al mi.

„Mi neniam supozis tion eble, juna viro. Mi pensis, ke Vi jam ekkuŝus sur la tero post la unua salto. Memkompreneble Vi ne pagu ion! Se Vi volas fari komplezon al mi, revenu kaj ĝisfine obeigu tiun bestaĉon. Mi ŝate donos al Vi dek dolarojn. Entute ne estas aĉa ĉevalo, kaj se ĝi lernos obei, mi faros bonan gajnon per ĝi.“

„Se Vi ne kontraŭas, estos plezuro al mi“, mi respondis.

Henry estis dirinta nenion ekde mi elseliĝis, li nur rigardis min kapskuante. Nun li ekkunbatis la manojn.

„Tiu *greenhorn* vere estas eksternorma aŭ plie nekutima *greenhorn*! Preskaŭ mortpremis la ĉevalon anstataŭ lasi sin ĵeti sur la sablon! Kiu instruis tion al Vi, *Sir?*“

„La hazardo, kiu donis sovaĝan, hungaran stepĉevalon, kiu permesis al neniuj sursidiĝi, inter miajn krurojn. Mi venkis ĝin iom post iom, sed riskis mian vivon dum tio.“

„Dankon pri tia kreitaĵo! Mi nur laŭdu mian malnovan kusenseĝon, kiu neniam kontraŭas, kiam mi volas sidi sur ĝi. Ek, ni iru. Mi preskaŭ svenis. Sed mi ne vidis Vin pafi kaj rajdi vane. Fidu pri tio.“

Ni iris hejmen, li al sia laborejo, kaj mi al mia loĝejo. La sekvintajn du tagojn li ne aperis. Ankaŭ mi ne havis tempon viziti lin. Sed je la tria tago poste li venis al mi je la posttagmezo. Li sciis, ke mi ne estis okupata.

„Ĉu Vi emas promeni kun mi?“ li demandis.

„Kien?“

„Al unu *gentleman*, kiu ŝatas ekkoni Vin.“

„Kial li volas ekkoni min?“

„Kvazaŭ Vi ne povus ĝin imagi! Ĉar li ne jam antaŭe vidis *greenhorn*:on.“

„Tiukaze mi kuniros. Tiun plezuron li havu.“

Henry faris sagacan, ageman mienon. Laŭ kio mi konis je li, li planis ian surprizon. Ni promenis laŭ kelkaj stratoj. Tiam li ektiris min de la strato en oficejon tra vasta vitropordo. Tio okazis tiel rapide, ke mi ne povis finlegi la orajn literojn sur la vitraĵo, sed mi kredis ekrimarki la du vortojn *Office* kaj *Surveying*. Baldaŭ fakiĝis, ke mi ne eraris.

Ni renkontis tri sinjorojn, kiuj akceptis Henry:n tre afable, kaj min ĝentile kaj scivole. Estis mapoj kaj skizoj sur la tablo, kaj inter ili ĉiuj specoj de mezuriloj. Ni estis en mezurista oficejo.

Kiun celon mia amiko sekvis per tiu vizito, ne estis klare al mi. Li nek volis mendi nek demandi ion, li ŝajne estis veninta nur pro amikeca babilado. La interparolo baldaŭ iĝis vigla. Iom post iom ĝi koncentriĝis kvazaŭ nevolite pri la objektoj, kiuj kuŝis ĉie sur la tablo. Mi kontentis pri tio, ĉar tiel mi povis pli bone partopreni, ol ke oni estus parolinta nur pri la amerikaj cirkonstancoj, kiujn mi tiutempe ne jam konis.

Henry ŝajnis ankaŭ hodiaŭ interesiĝante pri la mezura arto. Li volis scii ĉion, kaj mi volante lasis min eniĝi tiel ĝisdetale en la interparoladon, ke mi fine estis ade respondanta demandojn, klariganta la uzon de la diversaj iloj, kaj priskribanta kiel oni desegnis mapojn kaj skizojn.

Fakte mi estis vera *greenhorn*, ĉar mi neniam ekrimarkis, kiu estis kaŝita per ĉiu tiu demandado. Nur kiam mi estis paroladinta pri la eco kaj diferencaĵoj de la mapigado per

kolektado de koordinatoj, la polara kaj la diagonala metodo, la perimetra mezurado, la ripeteca procedo kaj la triangulado, kaj dume ekvidis, ke la tri sinjoroj kaŝe masignis al la pafilisto, la afero ekklarigis al mi. Mi ekstaris de mia seĝo pro sciigi Henry:n, ke mi volis foriri. Li akceptis, kaj ni estis adiaŭataj eĉ pli amikece, ol ni estis salutintaj.

Kiam ni estis irintaj sufiĉe for, ke ni ne plu povis esti vidataj de la oficeo, Henry subite ekstaris, metis sian manon sur mian ŝultron, kaj brile ridetis al mi.

„*Sir, Mann*, homo, junulo, *greenborn*, kian plezuron Vi faris al mi! Mi tute fieras pri Vi!“

„Kial?“

„Ĉar Vi superis mian rekomendon, kaj eĉ la ekspekton de tiuj sinjoroj!“

„Rekomendon, ekspekton, ĉu? Mi ne komprenas.“

„La afero tute facile komprenigeblas. Vi ja antaŭ nelonge asertis, ke Vi havas iom da sperto pri termezurado. Pro ekscii, ĉu tio nur estis mensogetado, mi kondukis Vin al tiuj tri sinjoroj, kaj lasis ilin ekzameni Vian fundamenton. Estas tre firma fundamento, kaj eĉ Vi tre impone konstruis sur ĝi.“

„Ĉu mensogetad—? *Mr. Henry*, se Vi vere supozas min mensogeti, mi neniam plu vizitos Vin!“

„Ne igu min ridi! Kaj estas Via devo ne rifuzi al maljunulo kiel mi la ple de Viaj vizitoj! Vi ja scias, pro la similo al mia filo! Ĉu Vi iris fojon plu al la ĉevalisto?“

„Ĉiun matenon.“

„Kaj ĉu Vi rajdis la rozfelulon?“

„Jes.“

„Ĉu la ĉevalo iam taŭgos?“

„Mi kredas, ke jes. Mi nur dubas, ke la aĉetonto iam kapablos ĝin regi kie mi. La besto kutimiĝis nur al mi, kaj deĵetas ĉiun alian.“

„Ĝojigas min, ĝojigas min ege! Ĝi do verŝajne emas porti nur *greenborn*:ojn. Kunvenu al tiu flanka strateto! Mi konas tie bonegan *dining-house*:on, en kiu oni manĝas tre bone kaj eĉ pli bone drinkas. Ni festu la ekzamenon, kiun Vi trapasis tiel eminente hodiaŭ.“

Mi ne rekonis Henry:n, li estis kvazaŭ anstataŭigita. La sola, sinretenema viro volis festi en *dining-house*! Ankaŭ lia mieno estis alia, nekutima, kaj lia voĉo sonis pli hele kaj pli feliĉe ol antaŭe. ‚Ekzameno‘ li diris. La vorto ŝajnis stranga al mi, sed certe ne havis pli gravan signifon ĉi cirkonstance.

Ekde tiu tago li vizitis min ĉiun tagon, kaj traktis min kiel karan amikon, kies foreston li baldaŭ suferus. Strangmaniere la konduto de la familio, kiu dungis min, same ŝanĝiĝis. La gepatroj zorgis pri mi plie ol antaŭe, kaj la geinfanoj estis pli fidiĝemaj. Mi trovis ilin, kiel ili rigardis min kaŝe per vido, kiun mi ne povis klarigi al mi. Ĝi povas esti priskribata kiel plena, sed ankaŭ bedaŭranta samtempe.

Ĉirkaŭ tri semajnojn post nia stranga vizito en la mezurista oficejo, la *lady* min petis ne forlasi la domon, sed partopreni en la *dinner* kun la familio. Kiel kaŭzo de tiu invito ŝi diris, ke ankaŭ venus *Mr. Henry*. Krome ŝi invitis du *gentleman*:ojn, el kiu unu nomiĝis Sam Hawkens, kaj estis fama okzidentulo. Mi, kiel *greenborn*, neniam antaŭe aŭdis tiun nomon, sed antaŭĝojis ekkonis mian unuan veran, kaj eĉ faman okzidentulon.

Ĉar mi estis domano, mi ne devis atendi ĝis la sonorilo eksonis, do mi iris en la *dining-room*:on kelkajn minutojn antaŭ la tempo. Tie mi ektrovis je mia miro, ke la manĝotablo estis pretigita kvazaŭ pro festo. La kvinjara Emmy estis sole en la ĉambro, ŝtelgutume metinte sian fingron en la berkompoton. Kiam mi eniris, ŝi rapide ĝin eltiris kaj purviŝis ĝin en siaj blondaj haroj. Mi vidis al ŝi punume, sed ŝi venis al mi kaj flustris kelkajn vortojn en mian orelon. Pro rebonigi sian krimeton, ŝi malkaŝis al mi la sekreton de la pasintaj tagoj, kiu estis preskaŭ sufokinta ŝian etan koron. Mi kredis, ke mi miskomprenis, sed je mia peto ŝi ripetis la vortojn: „*Your farewell-party.*“

Mia adiaŭa festo! Ja neeble povis esti! Estis nekompreneble, per kia miskompreno tiu infano havigis tiun strangan opinion. Mi ridetis pri tio. Tiam mi aŭdis voĉojn parolante en la antaŭa ĉambro. La gastoj venis, kaj mi iris pro saluti ilin. Ili ĉiuj tri venis je la sama tempo, per antaŭa interarangĝo, kiel mi eksciis poste. Henry konigis al mi junan, iom neflekseble kaj mallerte aspektantan viron, *Mr. Black*, kaj poste Sam Hawkins:on, la okcidentulon.

La okcidentulo! Mi konfesas malkaŝe, ke mi verŝajne ne aspektis tro sprite, kiam mi rigardis lin pli detale. Tiam ĉi ulon mi neniam antaŭe vidis. Pli poste mi ja ekkonis eĉ pli strangajn, sed nun tiu homo mem estis sufiĉe atentiga, kaj tiu unua impresio eĉ estis fortigata per la fakto, ke li staris tie, en la deca antaŭĉambro, tutekzakte sammaniere, kiel li estus staranta ekstere en la sovaĝejo, nedepreninte la ĉapelon, kaj kun la pafilo en la mano.

Sub la iel triste subependanta rando de lia felta ĉapelo, kies aĝo, koloro kaj formo povus kaŭzi sufiĉe da cerbumado eĉ al la plej akra pensanto, elstaris tra arbaraĵo de taŭzaj, nigraj barboharoj nazo, kiu havis preskaŭ timigan grandecon, kaŭ povis tauĝi al ĉiu sunhorloĝo kiel ombroĵetilo. Per la eksternoma barbo, krom la abunddimensia flarilo, estis nur videbla du malgrandaj, ruzecaj okuletoj, kiu ŝajnis posedi eksternorman rapidecon, kaj vidis al mi per saĝaca inteligento. La viro rigardis min same atente, kiel mi rigardis lin.

Lia kapo apartenis al korpo, kiu estis metita en malnovan, kaproledan ĉasveston ĝis la genuoj. La vesto verŝajne estis farita por tree pli dika viro, kaj donis al tiu ĉi malgranda viro aspekton de infano, kiu pro plezuro surmetis la dormvestaĵon de sia avo. El tiu kovraĵo eliĝis du maldikegaj, falĉilformaj kruroj, kiuj estis metitaj en pratempe malovajn franĝohavajn *leggin*:on, indianan pantalonon. Ĝi permesis senbaritan vidon al paro de indianaj botoj, en kiuj la posedanto eĉ estus povanta kaŝi sian tutan korpon en kazo de bezono.

En la mano la fama okcidentulo portis pafilon, kiun mi estus tuŝinta nur per ekstrema gardiĝo. Ĝi plie similis al lignobatilo ol al pafilo. Tiun momenton mi nur malfacile povus elpensinta eĉ pli ridigan karikaturo de unu pericĉasisto, sed nur malmulta tempo estu pasonta, ĝis mi ekkonis la veran valoron de tiu stranga ulo.

Post li estis rigardinta min ĝisdetale, li demandis la pafilfariston per malforta, infaneca voĉo:

„Ĉu tiu ĉi estas la juna *greenhorn*, pri kiu Vi rakontis, *Mr. Henry*?“

„Jes“, la pafilfaristo certigis.

„*Well!* Vere ne plaĉas aĉe al mi. Nur esperindas, ke Sam Hawkens ankaŭ plaĉas al li, hihihih!“

Post tiu malforta, tute persontipa rido, kiun mi ankoraŭ poste de li mil fojojn, li turniĝis al la pordo, kiu estis malfermata je tiu momento. La geestroj de la domo eniris kaj salutis la

ĉasiston per maniero, kiu pensigis, ke ili jam antaŭe renkontiĝis. Tio estis okzinta sen mia scio. Poste la geestroj invitis nin ĉiujn en la manĝoĉambbron.

Ni akceptis tiun deziron, kaj mi rimarkis je mia miro, ke Sam Hawkens eĉ ne ŝajne komencis demeti siajn aĵojn. Sed kiam ni estis sidiĝintaj, li montris al sia malnova pafilaĉo kaj diris:

„Vera okzidentulo neniam lasas sian pafilon ekster atento. Mi pendigos mian oldan *Liddy*-n tie sur la kurtenan hokon.“

Do li nomas sian pafilon *Liddy*! Pli poste mi ekkonis, ke estis la kutimo de multaj okzidentvagistoj trakti iliajn pafilojn kvazaŭ vivantaj personoj kaj nomi ilin. Li surhokigis sian *Liddy*-n kaj volis ankaŭ aligi sian ĉapelon. Kiam li deprenis ĝin, mi vidis je mia teruro, ke lia kompleta kaphaŭto dekapigis kune kun ĝi. La alvido, kiun lia senhaŭta, sangoruĝa kranio nun prezentis, vere estis timiga. La *lady* laŭte ekkriis, kaj la infanoj ŝrikegis. Li turniĝis al ni kaj diris:

„Ne ektimu, *mylady*-oj kaj *mes'ŝur*-oj. Ja estas nenio! M'estis portinta miajn harojn per plena rajto kaj ekde mia infanaĝo, kaj neniu advokato kuraĝis ilin malposedigi de mi, ĝis unu tagon ĉirkaŭ dek aŭ dudek *Pannee*-oj min subigis kaj ŝiris la harojn de mia kapo kune kun la haŭto. Estis diable ĝena sento al mi, sed mi travivis tion feliĉe, hihihih! M'iris tiam al Tekama kaj aĉetis skalpon novan, se mi n'eraras. Nomiĝis peruko, kaj kostis al mi tri dikajn kastorajn felojn. Sed ne domaĝas, ĉar la haŭto nova estas multe pli utila ol la eksa, speciale dum somero. M'povas ĝin demeti, se mi ŝvitas, hihihih!“

Li surhokigis la ĉapelon al la pafilo kaj remetis la perukon sur sian kapon. Tiam li demetis sian veston kaj kuŝigis ĝin sur seĝon. Tiu vesto videble estis flikita kaj plibonigita nenombrigeblajn fojojn. Je ĉiu plibonigo oni kudris unu ledoĉifonon sur la alian. Tiel la vestaĵo iĝis dum la tempo tiel malfleksebla kaj dika, ke certe neniu indana sago eblis penetri tra ĝi.

Nun ni ankaŭ povis vidi liajn maldikajn, kurbajn kruojn plene. La supran parton de lia korpo vestis leda ĉaskamizolo. Je la zono li havis tranĉilon kaj du pistolojn. Kiam li reatingis sian seĝon apud la mangtablo, li ĵetis ruzecan vidon unue al mi, poste al la estrino de la domo, kaj diris:

„La sinjorino certe ne malkaŝu al tiu greenhorn plu, kio okazas, se mi n'eraras, ĉu?“

Tiu esprimo, „se mi n'eraras“, ŝajne estis fiksa frazaĵo de li.

La *lady* kapjesis. Ŝi turniĝis al mi, montris al la pli juna gast kaj diris:

„*Sir*, verŝajne Vi ne jam scias, ke ĉi *Mr. Black* estos Via sekvanto.“

„*Mia*—sek—van—to, ĉ—?“ mi elpuŝis konsternite.

„Jes, fakte. Ĉar Vi hodiaŭ ja festas *Vian* adiaŭon, ni devis serĉi novan instruiston.“

„*Mian*—adi—aŭon—ĉu?“

Hodiaŭ mi gloras la sorton, ke mi ne estis fotografata en tiu momento, ĉar mi certe aspektis kiel la personigita perplekso.

„Jes, *Vian* adiaŭon, *Sir*“, si certigis kun graca rideto, kiun mi tute ne supozis dece tiu momente, ĉar entute mi ne emis rerideti. Ŝi pludiris: „Fakte la maldunga tempolimo ja estas ne baldaŭ atendinda, sed ni ne volas obstini kontraŭ Vi, Vi, kiun ni ekamis ekde *Via* ĉeesto.“

Ni bedaŭras, ke ni vidu Vin foriri, sed ni kunsendos la plej korajn bondezirojn por Vi dum tio. Do morgaŭ forvojaĝu kun la beno de Dio!“

„Forvojaĝi, ĉu? Sed kien?“ mi nur pene sukcesis diri.

Je tiu momemto Sam Hawkens, kiu sidis flanke de mi, frapis mian ŝultron per sia mano, kaj respondis ridante:

„Nu kien? En la Sovaĝan Okzidenton, kun mi! Vi ja pasigis Vian ekzamenon brile, hihihih! La aliaj *surveyor*-oj ekforrajdos morgaŭ, kaj ne povas atendi Vin. Vi kuniru, senkondiĉe! Mi, Dick Stone kaj Will Parker, ni ĉiuj estas dunigitaj kiel gvidistoj, ĉiam norden laŭ la Canadian ĝis en Texas:on. Mi certe pensas, ke Vi ne volas resti tie ĉi, savŝirmata kiel ajn *greenhorn*!“

Nur ĉi momente mi ekkonas, kiu okazis. Ĉi ĉio estis antaŭfiksita ludo! *Surveyor*, aremezuristo, eble eĉ por unu el la plej eminentaj fervojaj lineoj, kiuj estis planataj. Kia perspektivo ĉi tio estis! Mi ne bezonis demandi; mi ricevis la respondon nepetinte. Mia bona, olda Henry ekmetis sian manon sur la mian, kaj grumblis:

„Mi ja jam diris, kial mi ŝatas Vin. Vi ja estas tie ĉi je bonvolaj homoj, sed dungado kiel privatinstruisto ne ĝustas al Vi, *Sir*, tute ne. Vi iru okzidenten. Tial mi skribis al la *Atlantic and Pacific Company**, kaj lasis Vin ekzamenadi sen Via scio. Kaj Vi sukcesis bone. Vidu jen la dunga kontrakto!“

Li donis al mi la paperan certigon. Kiam mi vidis al la kontrakto, kaj tie trovis mian estontan salajron skribite, miaj okuloj preskaŭ falis el mia kapo per surprizo. Li sed pluis:

„Oni rajdos. Do Vi bezonas bonan ĉevalon. Mi aĉetis la rozfelulon, kiun Vi mem rajdkutimis. Vi havu ĝin. Kaj ankaŭ Vi bezonas armilojn! Mi kundonos al Vi la ursomortigilon, la malnovan, pezegan *gun*:on, kiun mi ne plu povas uzi, per kiu Vi sed trafas la celon je ĉiu pafo. Kion Vi diras ri tio, *Sir*, nu?“

Mi unue diris nenoin. Tiam, post mi regajnis mian parolpovon, mi volis ĝentile rifuzi la donacojn, set tio tute ne sukcesis. La bonaj homoj volis, ke mi iĝis feliĉa, kaj estus granda ofendo al ili, se mi estus daŭriganta mian rifuzadon.

Maljam post la manĝado estis dirata al mi, kion mi devis scii. La planata fervoja lineo iru de St. Louis tra la *Indian Territory* de Texas, New Mexico, Arizono kaj Kalifornio ĝis la bordo de la Pacifiko. Oni planis lasi esplori kaj mezuri tiun longan vojjon en apartaj etapoj. La vojparto, kiun mi kaj tri aliaj *surveyor*-oj prilaboru sub la observado de ĉefinĝeniero, troviĝis inter la fontejo de la Red River kaj la Canadian. La tri spertaj gvidistoj Sam Hawkens, Dick Stone kaj Will Parker konduku nin tien, kie ni renkontos aron de okzidentuloj, kiuj zorgos pri nia sendanĝerecon. Krome ni certe povis fidi pri la gardo de ĉiuj tieaj fuortaj garnizonoj. Pro surprizigi min, ĉi ĉio estis rakontata al mi nur nun. Ja estis iom tarde, sed trankviligis min la informo, ke mia kompleta ekipaĵaro jam estis prizorgita. Restis nenio farenda al mi, escepte de ekkoni miajn kunlaborantojn, kiuj atendis min en la loĝejo de la ĉefinĝeniero. Mi iris tien, akompanata de Henry kaj Sam Hawkens, kaj estis tre amikece salutata tie.

Kiam mi estis adiaŭiĝinta de la germana familio la sekvintan matenon, mi iris al Henry. Li ĉesigis mian dankparoladon per ekdiri en sia kruda maniero:

„Fermu Vian bekon, *Sir*! Mi sendas Vin tien elen do nur, proke mia maljuna *gun* povas kunparoli unu fojon plu. Se Vi iam revenos, vizitu min kaj rakontu, kion Vi spertis kaj

ekkonis! Tiam ni ja vidis, ĉu Vi ankoraŭ estos, kion Vi estas nun, senke Vi volas ĝin ekkoni: ja *greenhorn*, kiel ĝi estas priskribita en leksikono!“

Dum tiuj vortoj li ŝovis min tra la pordo. Sed antaŭ li fermis ĝin, mi vidis, ke estis larmoj en liaj okuloj.